# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO I. — SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO». — Nro 3

Aŭgusto Septembro 1912

Grupa sidejo : Str. Marqués del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU


BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF


ENHAVO : *Intima Danka Festo ĉe «Barcelona Stelo»*, Raportisto. — *Projekto de unugrupiĝo*, Pacemulo. — *Kondolenco*, Jozefo Grau.


## INTIMA DANKA FESTO ĈE «BARCELONA STELO» [1]

*(Daŭrigo)*

Sro. Grau, en la nomo de «Barcelona Stelo» dankis la grupanojn de «La Rondo», kiuj bonvolis honori nin akceptante nian inviton; sinjorojn Forcada kaj Carcereny por iliaj laŭdaj kaj kuraĝigaj frazoj; sron. Pujulá, kiu tiel ĝuste esprimis la dezirojn de la esperantistoj; la fraŭlinojn ĉeestantajn, kiuj estis la plej bela ornamo de la festo, la anojn de «Badalona Stelo» kaj la societon «Centro de Unión Republicana del VII Distrito», kiu sindone helpas la disvastigon de Esperanto. Li finis per la vortoj : «Al vi ĉiuj en unu frata ĉirkaŭpreno la esprimon de nia amo», kiujn li sendis al ĉiuj ĉeestantoj kaj kiujn oni aplaŭdis entuziasme.

Tiam, la prezidanto de «B. S.» donacis la bukedon ornamintan la prezidan lokon al simpatia fraŭlino Campdelacreu, kiu estas la plej malnova anino de «La Rondo».

Oni reiris en la dancosalonon, kie la dancado daŭris ĝis la dua matene. Ĝin oni finis per kantado de «La Espero», kiu inde kronis la tre belan feston partoprenitan de 150 gesamideanoj, kiuj sendube longe konservos bonrememoron pri ĝi.

RAPORTISTO

★ ★ ★

---

1) Vidu numeron 2 de la BULTENO DE «B. S.»

## PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

### POR LA BARCELONAJ ESPERANTISTAJ GRUPOJ

La 27$^{an}$ de Julio en la sidejo de «La Rondo» interŝanĝis opiniojn pri projekto de unuiĝo de la esperantistaj barcelonaj grupoj, kiun verkis Sro. Jozefo Grau laŭ komisio de la «Barcelona Stelo», Sroj. Campdelacreu, Igual, Aguiló, Molgosa, Cervera, Montserrat kaj Estrems el «La Rondo», Soler, Rovira kaj Badia el «Ĉiam Antaŭen», Rey, Gili, Navas, Pérez kaj Grau el «Barcelona Stelo»

Sro. Grau elvolvis sian detalan projekton, kiu malgraŭ kelkaj malgrandaj rimarkoj meritis la aprobon de la ĉeestantoj. Tial ili elektis komisionon konsistantan el Sroj. Soler, Campdelacreu, Rey, Igual, Gili kaj Boyé, kiun prezidos Sro. Rocamora kaj helpos Sro. Grau.

Tiu komisiono elstudos la tutan projekton kaj, redaktinte laŭ la eblaj interkonsentoj provizoran regularon, invitos ĉiujn barcelonajn grupojn delegi du reprezentantojn, kiuj, esplorinte la provizoran projekton, proponos la modifojn, kiujn ili opinios necesaj por starigi «Barcelonan Esperantistan Societon» kunigontan por komuna agado la grupojn, kiuj akceptis la definitive interkonsentitan regularon.

Ni esperas, ke la grupoj barcelonaj volos interesiĝi je tiu grava afero; kaj ĉar iliaj reprezentantoj povos labori super realaĵo — la projekto provizora de la Komisiono, kiu akceptos ĉiujn necesajn ŝanĝojn — kaj ne super abstraktaĵo — deziroj kaj intencoj ne enkorpiĝintaj en materiaĵon — ni antaŭvidas sukceson por la kuraĝa entrepreno.

PACEMULO.

★ ★ ★

## KONDOLENCO

Nia kara prezidanto, Sro. Stefano Rey, havis la malĝojon perdi sian malgrandan filineton Herminia, kiu mortis la 1$^{an}$ de Aŭgusto.

Al la geedzoj Rey kaj al ilia filino nia kungrupanino Fino. Mercé mi esprimas en la nomo de «Barcelona Stelo» ĝian sinceran kondolencon por la perdo de ilia filino kaj fratino.

JOZEFO GRAU.